

---

## 懺悔のあり方

### *Kiel estu pento?*

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

---

マスコミで政治家や企業の不祥事が明らかになるたびに、次のような言葉を聞きます。

「世間をお騒がせして申しわけありません」

私はこの言葉を聞くたびに、「あんたらが勝手に騒いでるだけだろうが...」というメッセージが隠れているような気がして不快な気分になります。いったい、人々が騒ごうが騒ぐまいが、犯した罪に変わりはないはずです。

「世間をお騒がせして申しわけありません」を言い換えると、「悪事が露見したことを詫げる」ということです。つまり、悪がばれた結果、人々があれこれ騒ぐことを遺憾に思う、ということであって、ばれなければ謝罪する必要はなかった、ということなのです。

これが政治家や企業の悪事ではなくて、普通の犯罪だったらどうでしょうか。例えば、連続通り魔事件の犯人が「世間をお騒がせして申しわけありません」と謝罪したとして、被害者遺族はどう感じるのでしょうか。謝罪になっていない、と怒りを感じるのでしょうか。政治家や企業の場合も、まず自分が犯した罪に真剣に向き合う必要があります。

さらに、「世間」とは何なのでしょう。この言葉は、「世界」でもない

Ĉiam, kiam malkovriĝas skandalo de politikistoj kaj entreprenistoj sur amaskomunikiloj, ili diras:

"Mi bedaŭras, ke mi tiel bruigis komunumon."

Aŭdante tiun ĉi diron, mi sentas malplezuron, ĉar en ĝi estas kaŝita mesaĝo: "Amaskomunikiloj agitas la popolamason, pro kio mi ne respondecas..." Nu, ĉu oni bruas, ĉu silentas, ilia kulpo devas esti senŝanĝa.

Se parafrazi la frazon "Mi bedaŭras, ke mi tiel bruigis komunumon," ĝi estas "Mi pardonpetas, ĉar mia fiago malkovriĝis." Ili bedaŭras, ke la popolamaso kritikas ilin pro ilia fiago. Se ilia fiago ne estus malkovrita, ili ne devus pardonpeti. Jen tiel estas ilia vera intenco.

Kiel oni dirus pri krimo fare de ordinaruloj, ne fare de politikistoj kaj entreprenistoj? Ekzemple se krimulo, kiu mortigis homojn sinsekve sur strato, dirus "Mi bedaŭras, ke mi tiel bruigis komunumon", kiel sentus la familianoj de viktimoj? Ili certe kolerus, ĉar la krimulo ne vere pardonpetas. Ankaŭ politikistoj kaj entreprenistoj devas unue alfronti sian krimon severe.

Kaj kion signifas "komunumo" (*seken*)? Tiu ĉi vorto ne signifas "la mondon" nek

し、「人々」でもない、外国語にはたいへん訳しにくい言葉です。辞書によれば、「人々が互いにかかわりあって生活している場。世の中。また世の中の人々」といったような意味らしいです。

私たちが生活する上で、そこにはどうしても人々とのつきあいが生まれますが、それは狭くは部落・村・町でしょうし、もう少し広くなると地域、さらに広くなると国になります。しかし決して全世界とかアジア圏という意味になることはありません。

一定の範囲の共同体が「世間」であるわけですが、私たち日本人にとって、この「世間」は規範という意味を持ちます。それは、私が何か行動を起したりする場合に、「世間ではこれをどう思うだろう」ということを無意識のうちに想像し、そこから自分の行動を制御しようとするをいいます。

ある学者が、このような日本人の行動様式を「世間教」と評しています。つまり、西洋の人々にとっては神が善悪の基準であり行動の規範となるのに対して、そのような神の役割は日本では「世間」がになっている、ということです。

こうしてみると、「世間をお騒がせして申しわけありません」という謝罪のしかたは、「世間」を疑似的の神とする無意識の規範から発せられたものとも考えられます。犯した罪とはあくまでも世間に対するものであり、世間が問題視しなければ、たとえ悪事であっても「世間の慣例」として

"publikon"; ĝi estas malfacile tradukebla en neĵapanan lingvon. Laŭ vortaro de la japana, ĝia signifo estas jena: "Loko, kie homoj vivas rilatante unu kun la alia reciproke. Aŭ homoj mem vivantaj en tia loko."

Kie ni vivas, tie nepre ekestas rilato kun aliaj homoj; ĝia sfero varias de vilaĝo aŭ urbeto en malvasta kazo al regiono en pli vasta kazo aŭ al lando en la plej vasta kazo, sed neniam etendiĝas al la tuta mondo aŭ la tuta Azio.

Komunumo en certa sfero estas do *seken*. Por ni japanoj tiu ĉi *seken* havas ankoraŭ alian signifon, t.e. *seken* estas normo. Nome, kiam ni volas agi iamaniere, ni senkonscie supozas, kiel *seken* taksos mian agon, kaj konsiderante tion ni regas nian agon.

Iu sciencisto nomas ĉi tian agmanieron de japanoj "*sekenkjo*" (komunumismo). Dum por okcidentanoj la Dio estas la kriterio de bono aŭ malbono kaj estas la normo de agado, en Japanio tian rolon de la Dio ludas *seken*.

Ĉi tiel konsiderante, ni povus diri, ke la maniero de pardonpeto "Mi bedaŭras, ke mi tiel bruigis komunumon" devenis de la senkonscia normo, ke *seken* estas la pseŭdodio. Pro tio oni temas pri kulpo nur kontraŭ *seken*. Kiam *seken* ne trovas problemon en iu ago, ĝi estas aprobata kiel "kutumo en *seken*", eĉ se ĝi estas

許してしまうことになります。大分の教育委員会汚職がよい例でしょう。

仏教では「懺悔」（さんげ）という言葉があります。これはキリスト教では「ざんげ」と言っていますが、本来は仏教用語で、キリスト教では「懺悔」よりも「告解」のほうが正式なようです。しかしどちらの場合も、

1) 罪を仏・菩薩あるいは師（キリスト教なら神）に告白する

2) 悔い改める

という二つの過程を総称するのです。

中国の善導大師は『往生礼讃』において、懺悔とはどういうことであるかを、三種類に分けて説明しています。

上品の懺悔とは、身の毛孔のうちより血を流し、眼のうちより血出ずをば上品の懺悔と名づく。

中品の懺悔とは、遍身に熱き汗毛孔より出づ、眼のうちより血の流るるをば中品の懺悔と名づく。

下品の懺悔とは、遍身徹り熱く、眼のうちより涙出づるをば下品の懺悔と名づく。

血や涙を流すくらいでなければ懺悔とはいえない、ということになります。私たちは、かつてそのような懺悔をしたことがあったでしょうか。世間が指弾しないのをよいことに、いつも言い訳・弁解をして自らの悪に眼をつむってきたことはないでしょうか。これは、政治家や企業だけの問題ではありません。

malbona. La afero de korupto far la eduka komitato en Ooita prezentas bonan ekzemplon.

En budhismo troviĝas la vorto "pento" (*sange*). Tiun ĉi vorton kristanoj prononcas kiel *zange*, sed ĝi estas origine budhisma termino. En kristanismo eble *kokkai* estus pli taŭga. Ĉiuokaze tamen ambaŭ religioj kunligas la du etapojn.

1) konfesi sian kulpon aŭ pekon al budho, bodhisatvo aŭ sia majstro (en la kazo de kristanismo, al la Dio).

2) elkore penti

La Majstro Ŝantaŭ en Ĉinio klarigas, kiel estu pento, en sia verko "Laŭdo de Renaskiĝo en la Pura Lando".

Ĉe la alta pento oni eligas sangon el poroj de la tuta korpo kaj eligas sangon el la okuloj.

Ĉe la meza pento oni eligas varmegan ŝviton el poroj de la tuta korpo kaj eligas sangon el la okuloj.

Ĉe la malalta pento oni sentas varmegon de la tuta korpo kaj eligas larmon el la okuloj.

Se oni ne eligas sangon aŭ larmon, oni ne vere pentas. Ĉu ni iam spertis tian penton? Ĉu ni ne fermadis la okulojn antaŭ niaj malbonaĵoj kun memdefendoj kaj mempravigoj, preteksante ke *seken* ne akuzas nin. Tio ĉi estas problemo ne nur por politikistoj kaj entreprenistoj.